# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 27/01/2022 Kvincentsesdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

*Uzindaj ligoj* *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 779,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **292,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **201,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **179,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)


## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*





## la esperanta retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

LA CERBO DISTINGAS VOĈOJN DUM DORMADO
22a jan 2022



**3ZZZ** La 24a de januaro estante la Internacia Tago de Edukado , unu el la temoj de la Esperanta elsendo en 3ZZZ estas edukado. Plie audeblas eltiraĵo de la prelego de Hong Sung Cho pri la inteligenteco de birdoj. *Franciska Toubale*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

## EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 70 de "Por Komencantoj".

**GRAMATIKAJ GVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). En la vorto "malsupriradantoj", kiuj estas la ses vortkunmetaĵoj"?


2). En la vorto "malsupriradantoj", de kiu kunmetspeco estas ĉiu el la ses vortkunmetaĵoj?

3). En "malsupriradantoj", kiu vorto estas la ĉefparto? (La aliaj estas flankpartoj).

4). Enmetu AŬ "lia" AŬ "sia" AŬ "lian" AŬ "sian" en "Mi renkontis la patron kaj ...... filo" kaj en "Mi renkontis la patron kun ...... filo" kaj en "La patro promenas kun ...... filo" kaj en "La patro kaj ...... filo promenas tie".

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 567. . *Marcel Leereveld.*



Mirinda! Naŭ esperantistoj partoprenis la dimanĉan ZOOM kunvenon anstataŭ kunveni en la Brizbana Biblioteko.

Ni dankas precipe Sandor kaj Jennifer Bundaberg. *Petro Danzer*



# La rerenkontiĝo de patro kaj filo

En iuj landoj de la mondo la suno ofte brilas. Tiuj landoj estas do konsiderataj idiliaj. Mi ankoraŭ ne malkovras al vi la nomon de unu el tiuj landoj, ĉar mi supozas, ke vi mem ĝin divenos laŭlonge de mia rakontado. Mi mem ne naskiĝis tie, sed tio okazis al tiom multe da aliaj homoj.

Ni ĉiuj scias kiel interagas ni homoj. Ni geedziĝas kaj naskas infanojn, almenaŭ la virinoj faras tion. La viroj nur edziĝas. Kaj kompreneble ni amas tiujn niajn infanojn, ĉu ne? Kaj de tempo al tempo okazas la neevitebla, la infanoj forpasas kaj lasas la gepatrojn tute senesperaj.

Io tia okazis ankaŭ en unu el tiuj landoj idiliaj, kie la suno ofte brilas. Patro perdis sian amatan filon kaj ploris longe, sed silente. Li tute ne deziris ĝeni siajn genajbarojn per tro da bruo! Tio daŭris multajn jarojn, kaj do iun belan tagon venis grizbarba maljunulo al la Pordegoj de la Ĉielo.

“Jes”, diris blankbarba anĝelo kun longa listo de la enloĝantoj de la Ĉielo. Tiu blankbarbulo fakte estis Sankta Petro. “Kaj kion ni povas fari por vi hodiaŭ?”

“Mi serĉas mian filon,” diris la grizbarbulo. “Mi estas ĉarpentisto.  Antaŭ tre longa tempo mi kaj mia filo laboris kune en mia laborejo. Oni diris al mi, ke li troviĝas ĉi tie. Laŭdire, li havas eĉ tre altan pozicion ĉi tie.”

“Nu”, respondis la blankbarbulo, rigardante sian longan liston. “Ni havas kelkajn ĉarpentistajn filojn ĉi tie. Unu aŭ du el ili plenumas altajn poziciojn. Ĉu via filo havas iujn distingajn markojn, per kiuj ni povos rekoni lin?”

La grizbarbulo pripensis iomete. “Nur kelkajn truojn en siaj manoj kaj piedoj”, li fine flustris.

Nun la blankbarbulo ridetis. “Nun mi scias, kiu estas via filo. Venu kun mi, ni trovos lin en la administrejo. Sed mi avertas vin, li estas treege okupata, kaj plej verŝajne li ne plu memoras vin. Malgraŭ ĉio, “li aldonis rigardante sian longan liston, “vi ne estas lia vera patro, ĉu?”

La grizbarbulo skuis sian grizan kapon, kaj li daŭrigis sian iradon. Sed proksimiĝante al la centro de la loko, ili subite aŭdis ĝojegan krion de unu el la altaj seĝoj, kaj persono rapidegis al ili kriante, Paĉjo! Kaj la grizbarbulo emocie respondis? “Pinokjo!!!”



Mi trovis tiun rakonton en mia komputilo. Mi ne memoras de kie mi havas ĝin, sed se plaĉos al vi, vi povos ja publikigi ĝin al niaj multegaj legantoj, ĉu ne?

Plej amike al vi de mi, *Bob Felby*

Ni havas situacion en kiu Usono kaj ĝiaj satelitoj en NATO havas solan politikan celon rilate al Rusujo - ĝia kompleta submetiĝo al usonaj diktoj kaj kontrolo,

Rusujo havas la ununuran celon, liberigi sin de la minaco de Usono-NATO unufoje por ĉiam, por ke ĝi povu disvolvi kaj prosperi kiel libera kaj suverena nacio.

[Peace In Our Time, Or War? – The Greanville Post](#) *Roger Springer*

# LA EDUKADA VALORO DE LA ZAMENHOFA DONACO AL LA MONDO (3)

7. Estas du tipoj de idiomaj esprimoj: tiuj kiuj ekestis en metafora kaj alifigura parolo, kaj kiuj ankoraŭ senteblas tiaj, kaj tiuj en kiuj vortoj ne povas esti prenitaj laŭ siaj efektivaj signifoj, cŭ pro tio, ke la signifo jam ŝanĝiĝis en historiaj aŭ eĉ en prahistoriaj epokoj, aŭ ĉar la originala ideo aŭ celo ne plu estas ekzistanta. Tiu unua tipo estas uzata en Esperanto tiom ofte kiom en aliaj lingvoj. Ĝia literaturo kaj uzado donas abundajn ekzemplojn de, kaj oportunojn por, figuraj dirmanieroj; ĝi estas vivanta lingvo en la tuta senco de tiu esprimo. La dua idiomotipo, kvankam bela se studata ligite kun siaj originoj, estas nenecesa ŝarĝo al klara, preciza lingvo, kaj igus ĝin maltaŭga por ĉiuflanka, internacia uzo; Esperanto estis konstruita ekskludi tiujn tipojn.

8. Vortoj kaj simboloj antaŭas pensojn, kaj lingvo estas la kadro de ideoj. La lingvo de Zamenhof provizas nin per klare difinita referencokadro por observado, kaj ĝia precizeco helpas akrigi la menson. Ĉi tio, per si mem, devus garantii la inkludon de Esperanto en la lernejaj kursaroj, eĉ se necesas iom da tempoofero fare de aliaj lingvostudoj.

9. Oni povas instrui Esperanton per ĉiuj el la diversaj metodoj per kiuj aliaj fremdaj lingvoj instruiĝas. Kio ajn la metodo, progreso ĝenerale estos kvin- aŭ sesoble pli rapida, kiel eksperimentoj jam montris. Unu instrumetodo, la indukta, postulas specialan atenton ĉar ĝi pli taŭgas al Esperanto ol al aliaj lingvoj. Ĉiujn el la 16 gramatikaj reguloj, kaj la signifon de ĉiuj prefiksoj kaj sufiksoj, oni povas lerni per indukto, t.e., la instruisto ne devigas siajn studantojn lerni la regulojn parkere kaj tiam apliki ilin, sed donas analogajn ekzemplojn, de kiuj la studantoj mem konstatas regulojn kaj signifojn. Pro tio, ke Esperanto enhavas neniom da esceptoj, ĉi tiu metodo estas tre fruktodona kaj faras la studon kaj uzon pli aktiva kaj pli interesa.

10. Unu el la plej grandaj pedagogiaj valoroj de Esperanto kuŝas en la fakto, ke ĝi ebligas gejunulojn plenumi sian naturan bezonon krei kaj eksperimenti. Multe de ĉi tiu bezono estas mortigita en junuloj ĉar ni bezonas, en nia scienca epoko, tiom da alta lerteco, ke la amasigo de fakta scio lasas nur tre malmulte da tempo por la kontentigo de ĉi tiu krea impulso. Esperanto donas tiun kontentigon; niaj junuloj mem povas kvazaŭ krei la tutan lingvon, kun la helpo de 16 gramatikaj reguloj, la afiksoj, kaj baza vortprovizo. Ili faras la lingvon, inventas novajn vortkonstruojn, serĉas por vortoj kiuj ankoraŭ ne estas uzataj, eksperimentas kun malsamaj stiloj kaj prilaboras sian propran literaturan sencon. Pograde ili adaptos sian stilon kaj vortuzadon al la ĝenerala Esperanto-stilo sed tiuj jaroj da invento kaj kreo en lingvo, da ĝojo kiam ili trovis, per komparo aŭ lerta konsilo, ke iliaj memfaritaj esprimoj kaj vortoj - parte la produkto de sia propra lerteco - estis perfekte klaraj kaj kompreneblaj por iu ajn Esperantisto ie ajn, tiuj jaroj, mi diras, estos donintaj al niaj jununloj grandegan kontentigon kaj valoran sperton por ilia pli posta vivo.





Finita. (Verkis *Marcel Leereveld*, tradukis *Vera Payne*)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## HAZEL GREEN .

En E.S.K. n.ro 144 en artikolo pri Hazel Green Terry rimarkigas ke "Mi certas ke aliaj havis similajn spertojn pri ŝia helpo." . Mi certe havis multan helpon de Hazel en la jaroj antaŭ 2006, kaj eĉ en la hobarta Somerkursaro de 2006, kiun mi kun Heather sole organizis el Melburno, Hazel bonvolis akcepti mian peton instrui en tiu kursaro, kion ŝi do faris, tre sperte, klere kaj estimate. *Marcel.*

# Seksaĵoj.

## SEKSFATALO.

La Naturo, aŭ Dio, kreis por la genro "homo" malpraktikajn kaj konfuzigajn seksperiodon kaj seksprocedon. Dum ĉevalo havas en unu jaro nur kelkajn semajnojn da seksimpulso, ĉe la homo tio okazas la tutan jaron, sen paŭzo. Krome ĉe la homo la Diodonita seksamo ne ĉiam sekvas la tempojn de la seksumado, kiel ĉe la ĉevalo. Ĉi tio kaŭzas, en la vivo de la homo, gravajn problemojn, kiuj mankas ĉe ĉevalo. Tiuj problemoj kreas vastan literaturon, sed la literaturo estus vasta ankaŭ se la homaj sekstempoj kaj –kulturoj estus limigitaj. Dum ĉe la ĉevalo la problemoj estas nur la eventualaj bariloj, ĉe la homo ĉe redukto de la periodoj kaj de la gefilaj prizorgadoj tamen restus sufiĉe da okazoj por riĉigi la literaturon. La homaro povus komenci medicine duonigi la seksemperiodon. Same kiel oni ŝanĝas la korpon kontraŭ la atako de la virusoj. Mi estas preta subiri tian korpoplibonigon. Por esti utila al mi mem kaj al mia partnero kaj al miaj samfamilianoj mi akceptus la plibonigon de mia korpo kaj la malplioftigon de miaj seksbezonoj. Cetere ekzistas plantoj kiuj faras la samon (kiel uzataj en la armeoj). *Marcel Leereveld.*

## LA TASKOJ DE LA VIRUSOJ.

*Hura! : "Let them rip!" "Let the viruses do their killing"*. La nova moto. "Ni volas senigi nin de la senutilaj: la gemaljunuloj, malsanuloj kaj malfortuloj!". *Marcel Leereveld.*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). 1) Mal + supr. 2) supr + ir. 3) ir + ad. 4). ad + ant. 5) ant + o. 6) o + j.

2). "Malsupr" = prefiksado. "suprir = prefiksado. "irad = sufiksado. "adant" = sufiksado. "anto" = vortspecado. "oj" = finaĵ(ad)o.

3). Laŭ Zamenhof "o", laŭ Kalocsay "j", kaj laŭ aliaj "antoj".

4). "Mi renkontis la patron kaj LIAN filon". "Mi renkontis la patron kun SIA filo".
"La patro promenas kun SIA filo.". "La patro kaj LIA filo promenas tie.".
(Notu: "La patrino vidas la patron promenantan kun SIA (= de la patro) filo" AŬ kun ŜIA (= de la patrino) filo").

*Marcel Leereveld.*

# AEA-Estrarkunveno 2021-09-30

Ni pardonpetas, ke ni ne publikigis niajn protokolojn dum multaj monatoj.

Partoprenis: Sandor, Joanne, Jonathan, Heather, Terry, Paul D.

**(1) Ni bonvenigis nian novan estraranon Paul Desailly.**

(2) **Komentoj pri la ĵusa somerkursaro/kongreso:**

Pozitiva: interesa, varia programo

Negativa: malgranda nombro de partoprenantoj

(3) **Ideoj por 2022**

Ni esploris kelkajn ideojn por la venonta jaro

- WhatsUp-grupo
  Muut-forumo: https://muut.com/esperanto-aus
- Konferencoj
- Telefoni membrojn
- Richard, Penny, Matt McGuire
- Aliaj grupoj: Amnesty? Greenpeace? Verduloj?
- Regula kurso por komencantoj, Brazilio
- NZ?
- Duolingo:
  **Duolingo Esperanto Learners** en Facebook (15 mil membroj):
  https://www.facebook.com/groups/464596177035738
- Iu prezentas ion dum la estrarkunvenoj
- Kvinslando, Tasmanio, Okcidenta Aŭstralio?

**Venonta estrarkunveno:**

**Jaŭdon, la 3-an de februaro 2022 je la 17:00 (NSW, QLD, VIC); 16:30 SA**

Informis nin: *Sandor Horvath*

Baldaŭ aŭstralianoj voĉdonos por decidi kiuj kontrolas la novan parlamenton.
Ĉu vi remarkas ke neniu partio subtenas pacon?
Ĉu milito aŭ paco ne estas la plej granda decido por la popolo?
Ĉu la problemo estas ke militi aŭ ne, ne estas decido de Aŭstralianoj sed de Britujo aŭ Usono?
Nur la *Green* partio subtenas pacon sed ne kiel grandan celon. Kial?? *Roger Springer*